



Babilanto

INFORMILO DE AGADO POR LA PROGRESIGO DE ESPERANTO EN TOGOLANDO

n-ro 09 oktobro – decembro 2014



Karaj legantoj,

Ekde kelkaj monatoj grava afero ĉefinfluas la novaĵon. Temas pri la epidemio je Ebola viruso kiu plagas la okcidentan Afrikon. Multaj klopodoj estas farataj tiom nacie, kiom internacie por ĉirkaŭlimigi la propagadon de la epidemio.

Ni do proponas al vi en tiu ĉi numero artikolon pri kiel la Ebola viruso transdoniĝas, kiel preventi la malsanon kaj kompreneble kelkajn statistikojn rilate al la evoluoŝtato de la malsano.

Flanke de lernantoj kaj instruistoj, estas nova lernojaro kiu komenciĝas. En Instituto Zamenhof – lernejo kiu instruas, krom la oficialan lerno-programon, Esperanton – antaŭ ol denove reiri al la laboro, ties personaro, gepatroj de lernantoj, malnovaj kaj novaj lernantoj kaj amikoj, ĉiuj kunfestis la dekan naskiĝ-datrevenon de tiu unika lernejo en la mondo, 13a sept. 14.

Jusjule eventoj estis organizitaj por ebligi al homoj mal-kovri E-on okaze de la Tago de Esperanto. Samperiode afrika esperantisto ĉeestis la 99an Universalan Kongreson en Argentino. Li spertis novajn renkontojn... Legu prefere la intervjuon kun li!

[Aĝevi Aĝe]

Chers lecteurs,

Depuis quelques mois l'actualité est dominée par un événement majeur. Il s'agit de l'épidémie à virus Ebola qui sévit en Afrique Occidentale. Beaucoup d'efforts se font tant sur le plan national qu'international pour circonscrire l'épidémie.

Nous vous proposons donc dans ce numéro-ci un article sur comment la maladie à virus Ebola se transmet, quelles sont les mesures de prévention et bien évidemment quelques chiffres par rapport à l'état des lieux de la maladie.

Côté élèves et enseignants, c'est une nouvelle année académique qui débute. A l'Institut Zamenhof – l'école qui dispense en dehors du programme officiel les cours d'Espéranto – avant de repartir à nouveau à la besogne, le personnel, les parents d'élèves, les amis, les anciens tout comme les nouveaux élèves ont tous ensemble célébré les 10 ans d'existence de cette unique école au monde, le 13 septembre dernier.

Des événements ont été organisés en juillet dernier pour permettre aux gens de découvrir l'Espéranto à l'occasion de la journée de l'Espéranto. Au même moment un espérantiste africain participait au 90^e congrès mondial d'Espéranto à Buenos Aires en Argentine. Il a fait de nouvelles rencontres... Lisez plutôt l'entretien avec lui!

Adjévi Adjé

Ebola viruso: reala minaco por Afriko kaj la cetera mondo

Ĉeftemas en konversacioj kelktempe aparta okazaĵo. Temas pri la hemoragia febro je Ebola viruso. Kvankam ekde la 1976-a jaro la mondo kutimiĝis pri tiaj epizodaj ekscitiĝoj, akompanataj de kelkaj mortoj, la nuna fenomeno transiris la limon de ĉio, kion oni spertis ĝis nun. Luj fontoj UNaj eĉ aŭguras ke la plej malbono ankoraŭ venos.

Kontaĝeco

La Ebola viruso estas transdonata de malsana persono al alia, kiu estas sana, per rekta kontakto kun la sekvaj organaj likvaĵoj: sango, vomajo, urino, fekaĵo, salivo, spermo, vaginaj sekrecioj, ŝvito. Ebolo transdoniĝas dum tuŝado de korpo de malsanuloj kiuj mortis pro Ebola viruso kaj per infektitaj personoj aŭ aĵoj uzitaj de malsanulo. Simioj, ratoj, vespertoj, antilopoj kaj porkoj kaj mortintaj bestoj trovataj en la arbaro kaj ĝangalo ludas gravan rolon en la transonado de la viruso al homo.

Prevento

Estas rekomendate eviti ĉian kontakton kun la organaj likvaĵoj de Ebola malsanulo. Oni ne tuŝu se oni ne estas protektita per gantoj, bluzo, masko, ĉapelo kaj protektaj botoj. Ne manipulu la korpon de mortinto de tia malsano, nek tuŝu ties vestaĵojn kaj aliajn aĵojn kiujn li/ŝi uzis. Oni ankaŭ rekomendas ne tuŝi aŭ manĝi la viandon de bestoj trovitaj mortintaj. Estas forte rekomendate lavi siajn manojn per pura akvo kaj sapo aŭ per cindro antaŭ ol manĝi, post necesumi, kaj revene al hejmo, por protekti sin kontraŭ Ebolo.

Simptomoj

Du ĝis dudek unu tagojn post la kontaĝo, Ebolo evidentiĝas per jenaj signoj: subita kresko de la febro; intensa laceco;



kapdoloroj; muskolaj aŭ artikalaj doloroj; naŭzoj kaj vomado; singultaj diareoj; haŭtaj erupcioj; sangado de la gingivoj, de okuloj (ruĝaj okuloj), de nazo, de oreloj, de anuso kaj kelkfoje de vojoj urinaj; rena kaj hepata nesufiĉeco.

Kuracado

Ekzistas nek kuracilo, nek vakcino kontraŭ tiu malsano nuntempe. Sed se la malsanulo sufiĉe frue ricevas flegadon de kuracistoj, tio povus pliigi ties eblojn de resaniĝo.

Kelkaj nombroj

Ebolo estas tre danĝera, kontaĝa kaj mortiga malsano kaŭzata de viruso, 60-90% de malsanuloj mortas pro tiu malsano. Je la 31-a de aŭgusto 2014, la nombro de Ebolaj kazoj en okcidenta Afriko estis 3407 kaj la nombro de mortintoj estis 1848,

laŭ la Monda Organizaĵo pri Sano (MOS). La plimulto de kazoj kaj mortoj okazis en tri landoj: Gvineo, Liberio kaj Siera-Leono. Niĝerio havas 21 kazojn kaj 7 mortojn. Kaj Senegalio nun havas konfirmitan kazon de Ebolo.

Enlanda dispono

Neniu kazo de persono havanta hemoragian febron ĝis nun rimarkiĝis en nia lando Togolando. La enlandaj aŭtoritatoj pri la sano starigis antaŭ kelkaj monatoj aranĝon por sanitara prizorgado kaj interveno. La tasko de la aranĝo estas detekti kaj se necese izoli ajnan malsanulon de Ebola. La loĝantoj do estas invitataj telefoni al 111, la verda numero, kaze de dubinda kazo. La telefon Alvoko estas senpaga.

Babilanto

Virus à Ebola: une réelle menace pour l'Afrique et le monde



Les singes, les rats, les chauves-souris, les antilopes et les porcs ainsi que les animaux trouvés morts dans la forêt et dans la brousse jouent un grand rôle dans la transmission du virus à l'homme.

Prévention

Il est recommandé d'éviter tout contact avec les liquides organiques d'un malade atteint du virus d'Ebola. Il ne faut pas toucher si l'on n'est pas protégé par des gants, une blouse, un masque, un bonnet et des bottes de protection. Il ne faut pas non plus manipuler le corps d'une personne décédée des suites de cette maladie ni toucher ses habits et tout autre objet qu'elle a utilisés. Il est vivement conseillé de se laver les mains à l'eau propre et au savon ou à la cendre avant de manger, après avoir été aux toilettes et au retour à la maison, pour se protéger contre la maladie à virus Ebola.

Incubation et symptômes

Deux à vingt-et-un jours après la contamination, Ebola se manifeste par les signes suivants: montée brutale de la fièvre; fatigue intense; maux de tête; douleurs musculaires ou articulaires; nausées et vomissements; diarrhées hoquets; éruptions cutanées; saignements au niveau des gencives, des yeux (yeux rouges), du nez, des

oreilles, de l'anus et parfois des voies urinaires; insuffisance rénale et hépatique.

Traitement

Il n'existe ni traitement ni vaccin contre cette maladie en ce moment. Mais si le malade est pris en charge à temps, cela pourrait augmenter ses chances de guérison.

Quelques chiffres

La maladie à virus Ebola, est une maladie très dangereuse, contagieuse et meurtrière provoquée par un virus, 60 à 90% des malades décèdent de cette maladie. Au 31 août 2014, le nombre de cas d'Ebola en Afrique de l'Ouest s'élevait à 3407 et le nombre de décès à 1848, selon l'OMS. La majorité des cas et des décès ont été signalés dans trois pays: la Guinée, le Libéria et la Sierra Leone. Le Nigéria compte 21 cas et 7 décès. Et le Sénégal a désormais un cas confirmé d'Ebola.

Dispositif de veille

Aucun cas de patient développant la fièvre hémorragique n'a encore été signalé dans notre pays le Togo. Les autorités de la santé ont mis en place un dispositif de veille et d'intervention il y a plusieurs mois. La veille sanitaire se charge de détecter et si besoin d'isoler tout malade atteint du virus d'Ebola. Les populations sont alors invitées à composer le 111, le numéro vert, en cas de cas suspect. L'appel est gratuit.

Un évènement particulier défraye la chronique depuis un certain temps. Il s'agit de la fièvre à hémorragie d'Ebola. Bien que depuis 1976 le monde ait été habitué à ses épidémies flambées, accompagnées de quelques morts, le phénomène actuel dépasse tout ce qu'on a connu jusque là. Selon certaines sources onusiennes le pire est encore à venir.

Transmission

Le virus Ebola se transmet d'une personne malade à une autre qui est saine par contact direct avec les liquides organiques suivants: le sang, les vomissures, les urines, les selles, la salive, le sperme, les sécrétions vaginales, la sueur. Le virus Ebola se transmet lors des manipulations de corps de malades décédés de la maladie à virus Ebola et à travers des personnes infectées ou des objets ayant servi au malade.

Esperanto-Tago 2014 en Lokossa, Benino

Okaze de la Esperanto-Tago 2014, la estraro de ACM - Afrika Centro Mondcivitana kunsidis kaj planis organizi aktivajojn. Ni proponis multon kaj la infanoj de ACM-Benino emfazis pri piedpilka turniro. Estos la plej bona rimedo per kiu ni facile povos atingi la neesperantistojn al kiuj ni disdonos francajn kaj Fon-gbeajn afiŝojn. La estraro kaj la infanoj do interkonsiliĝis kaj invitis la teamojn de diversaj anguloj de Lokossa. Entute ok teamoj partoprenis la turniron. Inter ili neniu aŭdis antaŭe pri Esperanto. Por ili estis mirinde.

La 12-an de julio ekis la unua ludo. Estis ĉiutaga ludo. La evento okazis sur du terenoj en Lokossa kaj daŭris du semajnojn. La 26a de julio estis la ĉefa tago, kiam ni devis aŭdigi al invititoj pri la festata Tago per disdono de Fon-gbeaj afiŝoj kaj francaj. Antaŭ la komenco de la finalo je la 16-a horo, ni prelegis tri horojn pri Esperanto kaj pri la Tago mem, danke al la klariga teksto pri la Esperanto-Tago. Ni montris kaj disdonis kelkajn materialojn por atentigi la invititojn, ke ankaŭ eblas verki kaj fari ĉion per Esperanto. Ni elmontris kial estas la Esperanto-Tago kaj kial ĝi estas grava tutmonde. Poŝkalendarioj estis disdonitaj. Ni instigis la ĉeestantojn lerni Esperanton

kaj ni esprimis nian pretecon senpage instrui al ili la lingvon.

Menciindas la elsendo de la loka radiostacio pri la Eo-Tago. Francois Hounsounou donis intervjuon pri la Tago la 23-an de julio per kiu li klarigis al la loĝantoj tra la radio-ondoj pri la Esperanto-Tago kaj petis al ili ne konfuzi ĝin kun la Zamenhofa-Tago, kiu okazas ĉiu-decembre. Li respondis al demandoj de la ĵurnalisto kaj sugestis al la aŭskultantoj lerni Esperanton pro la fakto ke ĝi estas ilo por atingi justan komunikadon inter malsamaj popoloj. La intervjuo estis elsendita dum tri tagoj.

La Tago disvolviĝis tre sukcese danke al la helpo de la unua vicurbestro de Lokossa, kiu kontribuis al la realigo de la futbala turniro, donacante al ni pilkojn. Dankon al Zinkpè Kodjo Benoit - eksfocisto de Afrika Oficejo - kiu ankaŭ subtenis la iniciaton. Bedaŭrinde pro malsano, li mem ne povis fizike ĉeesti la eventon. Li telefono




tamen parolis kun la invititoj. Pro financaj malfacilaĵoj, du esperantistoj el la ĉefurbo Kotonuo kaj el la urbo Come ne sukcesis vojaĝi al Lokossa. Ili bonkore subtenis nin.

Multan dankon al Peter Oliver, kiu volonte kunlaboris kun ni por la realigo de Fon-gbea afiŝo. Ankaŭ apartan dankon al la asocio Esperanto-France kaj al francaj esperantistoj, kiuj helpis nin pri la okazigo de la Esperanto-Tago.

François Hounsounou

...kaj Togolandaj elpaŝoj



La loka radio Nana Fm elsendis menditan radioreklamon, kiu aŭdeblis dufoje tage pri la nacia movado kaj aparte pri la Esperanto-Tago dum tri tagoj, ekde la 23-a ĝis la 25-a de Julio. Samperio de la Eve-lingva aŭdiogramo jam estis videblaj en publikaj lokoj, ĉefe en la universitato de Lomeo cele al atentigo de la universitata publiko pri la fenomeno Esperanto.

La kulmino de tiuj klopodoj markiĝis en la mateno de la 26-a per estrarkunveno de la landa asocio (UTE), dum kiu diskutiĝis i.a. plano pri la estonteco de la movado kaj lingvaj kursoj kunlabore kun TIETTI Instituto de Esperanto en Togolando en la privata lernejo Institut Zamenhof en la tuj posta monato. En la posttagmezo kelkaj el ĉeestantaj estaranoj ankaŭ partoprenis en la postaj aktivaĵoj kio konsistigis komunan spektadon de la filmo de D. Gautier. Filmo kiu prezentas la historion kaj Esperanton tra nombraj renkontiĝoj tra la mondo.

En la vespero, tra seanco de malkovro, la ĉeestantoj sciiĝis franclingve pri la signifo

de Esperanto-Tago kaj pri la ŝloŝila rolo de Esperanto kiel ilo por lingva justeco. En kromaj diskutoj estis aparte emfazo pri la trajtoj de Ebola viruso, tre danĝera malsano kiu mortigas milojn da homoj en la Afrika regiono. Gitarludo de nia amiko Ekougninougan K. Arnault tra ĥora kun-kantado de esperantlingvaj kantoj originale verkitaj de li agrable altigis la festan etoson.

Malgraŭ, ke ne estis granda nombro da ĉeestantoj, kiel atendite, la malmultaj personoj kiuj venis vere ĝuis la Tagon ne nur kiel okazon por malkovri Esperanton, sed ankaŭ kiel rendezvon por revidi unu la alian. Entute sukcesa festotago, kiu disvolviĝis ankaŭ kiel forumo, tiel ke ĉiu ajn partoprenanto havis eblon esprimi opiniojn, starigi demandojn aŭ fari proponojn ĝenerale pri aktualaj temoj.

La radioanoncon pagis la landa asocio, dum la festan programon aranĝis APETO, kunlaboranta organizaĵo, kies membroj regule kolektiĝas por lerni kaj interŝanĝi informojn, kadre de Babilmanĝo.

Babilanto



E-ekzamenoj en IZO

Dum la lerneja jaro 2013-2014, pluokazis kiel kutime, la Esperanto-kursoj en Instituto Zamenhof (IZO). Fine de la jaro okazis speciala sesio por helpi al interesiĝantoj trapasi ekzamenojn de ACE – Afrika Centro Esperantista. La kurso okazis de la 23-a de junio ĝis la 12-a de julio 2014, kiam komenciĝis la ekzamenoj. Ĉi tiuj finiĝis la 15-an de julio 2014.

Estis 35 ĝelernantoj ĉe la nivelo A kaj 12 ĉe la nivelo B. Ne ĉiuj povis sekvi la kurson ĝisfine. Tial 15 kandidatoj trapasis la ekzamenon A, dum 5 la ekzamenon B. La sukceso estis tuta ĉe la ekzameno B, dum nur kvin kandidatoj sukcesis ĉe la ekzameno A.

La kurson gvidis s-roj AMEDJO Kodjo, KODO Kodjo Ignace (ekslernantoj de IZO nun studentaj en liceoj), KOUFIONOU Koffitche kaj GBEGLO Dzifa, sub la super-rigardo de Koffi DOUMEGNON kaj GBEGLO Koffi. Ĉe la fino de la ekzameno, la sukcesintoj ricevis diversajn premiojn de Instituto Zamenhof, kiu kuraĝigas ilin plulerni la lingvon. Ili ĉiuj promesis reveni ellerni la lingvon dum la feria Esperanto-kurso, kiun organizas TIETTo kunlabore kun UTE. Plie, ili serĉas E-amikojn tra la tuta mondo. Kiu interesiĝas pri tiu ĉi informo, tiu ne hezitu kontakti nin ĉe la retadreso:

koffidoumegnon@hotmail.com aŭ
esp.togo@cafe.tg

DOUMEGNON Koffi



Bonvolu aliĝi!

Por legi la plej freŝajn artikolojn pri Eo en Togolando, necesas membriĝi en:
esperanto-en-togolando-subscribe@yahoogroups.com

aŭ viziti la renovigatan retpaĝaron de UTE:
<http://unuighotogolandaporesperanto.jimdo.com>

En la retejo elŝuteblas ankaŭ la aliĝilo de UTE.

La aliĝo estas malmultekosta kaj ĝi multe helpas la estraron de UTE subteni kaj kreskigi la Eo-komunumon en Togolando.

Bonvolu aliĝi - ni bezonas vian helpon!

Emile Malanda: « instruadi Esperanton estas mia prioritato »



De maldestre: Emile M kaj K. Kovats

Vi ĉeestis la 99-an UK en Bonaero, Argentino. Ĉu vi bonvolas priskribi viajn impresojn pri tiu kongreso (via unua UK!)?

Antaŭ ĉio mi dankas vin pro la okazigo de tiu ĉi intervjuo kaj mi gratulas vin pro la starigo de “Babilanto” en Afriko.

Ĉiu medalo havas du flankojn, same ĉiu homa evento havas du facojn. Miaj impresoj estis tre agrablaj pro la fakto ke por la unua fojo mi ĉeestis la Universalan Kongreson en mia E-vivo. Mi malkovris ke UK estas taŭga rendevuejo kaj advekata okazaĵo por spert(ig)i la veran funkciadon de Esperanto inter la diversaj lingvo-parolantoj kaj popoloj. Sed menciindas ke mi alvenis malfrue, je la 3-a tago. Mi ne profitis la grandan momenton de la malferma ceremonio por konatiĝi sufiĉe kun Kongresanoj. Multaj serĉis min sed ne trovis min. Kiam mi alvenis iom pli poste ĉiuj estis okupataj. Malgraŭe, mi havis okazon, ne nur konversacii, sed ankaŭ manpremiĝi kaj fotiĝi kun gravuloj de la Estraro kaj de la Centra Oficejo de UEA.

Partopreno en UK postulas grandajn elspezojn. Oni devas akiri enirvizon, pagi, krom la kongresan kotizon, ankaŭ restadon en hotelo ktp. Kiel prepariĝis tiu via vojaĝo financkampe? Ĉu vi ricevis ian subtenon de la movado?

La sukceso de tiu mia vojaĝo estis miraklo! Neniu E-asocio, enlande aŭ eksterlande, subvenciis min. Mi preparis min de pluraj jaroj por realigi ĉiĵojn mian revon. UEA nur pagis por mi la aliĝkostojn dank'al s-ro Osmo Buller, kiun mi private kontaktis ĉi-rilate (mi dankas lin pro tia bonfaro). Anonima persono - neesperantisto -

grandparte sponsoris mian flugbileton. La ceteran monon mi ŝparis danke al mia laboro.

En Bonaero vi nepre ankaŭ partoprenis en kunvenoj, forumoj ktp. Kio pri tio?

Ĉu vi volas diri dum la UK? Se jes, komprenable! Interesaj programoj abundis dum la UK. Kaj mi ne partoprenis la UKn por amuziĝi sed por akiri spertojn dum diversaj programoj por reveni en Afrikon profitigi al afrikanoj. Bedaŭrinde mi ne sukcesis en ĉio. (Estas nepenseble ke ununura afrikano el Afriko partoprenis!). Povis okazi du gravaj programoj je la sama horo kaj en malsamaj ĉambroj (ekz. “Centra Oficejo Respondeca”, prezentita de Osmo Buller, kaj “Instruistoj [ILEI]”, de Mireille Grosjean, okazis samhore. Tamen mi strebis ĉeesti tiom multajn erojn, ke mi havis multan laciĝon. Alia ekzemplo estas: la KER-Ekzameno – kiu estis deviga por mi – igis min maltrafi kelkajn programojn. Mi preskaŭ ne ripozis dum la UK, eĉ ne kunmanĝis kun aliaj bonaj esperantistoj kiuj invitadis min. Plie, okazis neforges-ebla futbalmatĉo dum kiu mi persone ludis. Mi estis la sola afrikano en la internacie selektita teamo. Neniu okazis postkongrese! Eble pro la fakto ke lokaj esperantistoj ne multe atentis pri mi! Ni provis plani postkongresan prelegon kun la prezidanto, Jorge E. Cabrera, de la Argentina E-Ligo sed malsukcese. Ĉiuj Argentinaj esperantistoj aŭ estis lacaj post la UK, aŭ estis tro okupataj kun siaj amikoj kiuj ankoraŭ restadis en Argentino.

Afriko certe estas ideala grundo por Esperanto, tieaj homoj havas Junecon, entuziasmon kaj deziron progresi malgraŭ malfacilaj kondiĉoj. Ĉu vi tamen havis impreson, ke la cetera komunumo havis interesiĝon pri la verda laboro sur nia kontinento?

Mi vere havis impreson ke ni afrikanoj devas kalkuli pri ni mem. Neniu el la ekstero kapablas verdigi nian kontinenton pli bone ol ni mem, kvankam ni bezonas ĉies helpon. Unue ni devas labori por partoprenigi afrikanojn el Afriko al la diversaj venontaj UK-oj. Neniu povas senti Afrikon

aŭ paroli pri la E-agadoj en Afriko pli reale ol Afrikanoj mem! Mi emfaze ripetas tion!

Vi sendube revenis hejmen kun sufiĉe da energio por daŭrigi la komunan verdan laboron. Ĉu vi havas apartan planon por kontribui al la disvastigo de Esperanto en Sudafriko? Se jes, kiamaniere vi planas elturniĝi?

La sola fakto kiu kontribuas al la disvastigo de E-movado estas la E-instruado. Mi petas ke en ĉiu regiono de Afriko oni starigu aŭ relanĉu la E-kursojn; informu per pluraj manieroj al neesperantistoj pri la ekzisto de Esperanto. Ne ekzistas alia maniero grandigi la E-komunumon ol instruadi Esperanton al neesperantistoj. Ankaŭ tio devas esti la celo de ĉiu Landa E-Asocio. Mia aparta plano jam ekzistis kaj ĉiam ekzistos! Instruadi Esperanton estas mia prioritato. Mi konkrete iniciatis Ne-Registaran Organizon, jam agnoskitan de Sudafrika registaro, por instrui Esperanton flanke de aliaj lingvoj. Tiu strategio disvastiĝos en aliaj landoj de Afriko helpe de esperantistoj kaj mi estos la instiganto. Ankaŭ mi planas alvoki ĉiujn samkontinentajn gesamideanojn grupiĝi en unusola amikaro.

En 2015 okazos la 100-a UK en Lillo, Francio. Espereble vi ĉeestos?

Historia UK kiun vere mi ŝatus partopreni se UEA pagus por mi la kongresan kotizon kaj se mi trovus denove sponsoron. Ĉar mi havas multon por daŭre prezenti al aliaj esperantistoj en la mondo kadre de UK. Sed tamen, plibonas ke tio estu preparata kaj kunordigata ene de Afrika Komisiono de nun, laŭ la regionoj en Afriko (sude, meze, oriente kaj okcidente). Do, AK devas enorde kaj klare ripeti la nomumon de la reprezentanto de ĉiu Afrika regiono laŭ la rezolucio de la 5-a Afrika Kongreso de Esperanto, okazinta en Benino lastjare.

Ĉu vi havas ion apartan por vortumi al la legantoj de Babilanto?

Mi deziras al ili bonan legadon kaj petas de ili iel subtenadi tiun informilon. Manon en mano kaj paŝon post paŝo Esperanto pluiros en Afriko. Kaj Esperanto nur venkos kiam afrikaj esperantistoj unuigos.

intervjuis La redakcio

Togolanda E-kongreso: baldaŭ 22-an fojon! Congrès d'Espéranto, bientôt la 22^e édition!

Unuigo Togolanda por Esperanto (UTE) organizas la 22-an Togolandan Esperanto-Kongreson (TEK) sub la temo: “**Konsciigo pri Esperanto**”, en la urbo Aného la 26-an kaj 27-an de decembro 2014.

Pluraj dekoj da partoprenantoj venos el Eŭropo kaj el la najbaraj landoj por interŝanĝi, interkonsiliĝi, kunlabori pri la estonto de la movado en fratiga kaj amikeca etoso.

Flanke de laborseancoj, filmoj kaj aliaj distraĵoj estos prezentitaj. La partoprenantoj malkovros la historion de Esperanto en Togolando kaj la landan asocion. Aliaj poste lernos en la seminario AMO ekzemple pri temoj kiel: “Konstruo kaj gvido de kluboj”, “Kreo kaj redaktado de retpaĝoj”, “Lobiado”, “Internacia kunlaboro”.

Ekde la 1990-aj jaroj Togolandaj Esperanto-Kongresoj estas organizataj ĉiun jaron en malsamaj Togolandaj urboj: oportunaĵo por sperti novajn renkontojn kaj vige praktiki la internacian lingvon Esperanto.

Por havi pliajn informojn pri la kongreso oni telefonu al: 99 57 26 23, 22 27 51 64 aŭ vizitu: <http://unuighotogolandaporesperanto.jimdo.com/22-a-tek/>

L'Union Togolaise pour l'Espéranto (UTE) organise les 26 et 27 décembre 2014 sous le thème: «Prendre conscience de la valeur de l'Espéranto».

Plusieurs dizaines de participants viendront d'Afrique et d'ailleurs pour échanger des expériences, se consulter et travailler pour l'avenir de l'Espéranto au Togo et en Afrique dans une atmosphère d'amitié et de fraternité.

Des films seront présentés au côté des séances de travail. Les participants vont pouvoir découvrir l'histoire de l'Espéranto au Togo et de l'Union Togolaise pour l'Espéranto. D'autres ensuite vont être formés au cours du séminaire AMO sur des thèmes comme: “Construction et organisation des clubs”, “Création et rédaction de pages web”, “Lobbying”, “Collaboration internationale”.

Depuis les années 90 des congrès d'Espéranto sont organisés chaque année dans différentes villes du Togo: une opportunité pour faire de nouvelles rencontres et pratiquer de vive voix la langue internationale Espéranto.

Pour plus de renseignements téléphonez au : 99 57 26 23, 22 27 51 64 ou visitez: <http://unuighotogolandaporesperanto.jimdo.com/22-a-tek/>

Komisiono por UNESKO en DR Kongo agnoskis la landan asocion DKEA

Demokratia Kongolanda Esperanto-Asocio (DKEA), landa asocio de UEA honorigis per rekonon fare de la enlanda komisiono por UNESKO en DR Kongo. La ceremonio okazis en la ĉefurbo Kinŝaso en la paroĝejo "Notre Dame de Fatima" la 5-an de julio 2014.

La ceremoniaj aktivaĵoj komenciĝis per la kantado de la nacia himno "Debout Congolais" (Leviĝu Kongolandanoj) kaj de la "Espero". La gejunuloj de Konga Espero, muzika grupo de la Nacia Pedagogia Universitato (UPN) en Kinŝaso tre bone kantis la himnojn.

Tuj poste sekvis la prezentado de la gravuloj al la ĉeesta publiko, de la alta ĝis la malalta podio nome: 1) s-ro Jean-Pierre LUNGKISA – Prezidanto de DKEA, 2) s-ino Bernardine ESUNGI – Direktorino pri la Kooperativo kaj Kooperativaj aktivaĵoj ĉe la Nacia Komisiono por UNESKO

(retadreso: bernardineesik@hotmail.com telefonnumero: +243 815991253), 3) s-ro Lazare LIEMA IBONGO BOTIE – Konstanta Sekretario de la Nacia Komisiono por UNESKO (retadreso: liemaib@gmail.com, telefonnumero: +243 815215567), 4) s-ro Victor LUFIMPU LUKOLAMA – Vicprezidanto de DKEA, kontaktpersono de ILEI kaj membro de la Afrika Komisiono en DR Kongo), 5) s-ro YEYE LOFULUA Jean-Robert – Konsilisto kaj membro de la Nacia Komisiono por UNESKO, 6) s-ro Louis NKONDO NDAYE – Konsilisto kaj membro ĉe la Nacia Komisiono por UNESKO (retadreso: isaac.lu@live.fr telefonnumero: +243 810262648). Ĉeestis ankaŭ religiulino Alphonsine M POLO, delegito de la Provinco Bas-Congo, precipe de LUKALA. Lukala urbo estas la fonto mem de Esperanto, kie ekburĝonis la unua semo dank'al s-ro NGANGU NDONTONI BAKIDILA, s-ro FUNGULA Vital – Respondeculo de la Kinŝasa Centro pri



Edukado kaj profesoro SUMBU ZOLA Eric, Agronomia fakultatestro en la Universitato de Kinŝaso.

Poste estis la vico de paroladoj. Per sia parolado la prezidanto de DKEA bonvenigis la ĉeestantojn kaj klarigis al ili la celon de la ceremonio. La dua parolanto estis s-ro Eddy ONAN EDIAMBAS, la nuna prezidanto de Demokratia Kongolanda Esperanto Junulara Organizo (DKEJO). Li enkondukis la fraŭlinon Eulalie BALAKASHI. Tiu ĉi estas unu el la plej aktivaj junulinoj de la klubo en UPN. "Ni, Kongaj infanoj, la morgaŭa estonto, aliĝas al Esperanto por antaŭenigi la kulturon de paco, de justa komunikado, de nova civitaneco kaj de justeco" ŝi konigis.

Per skeĉo kun titolo "la interpretisto", s-ro MAFUILA MAVOMO TUNGA Barba reliefigis miskomprenon kiu naskiĝas ofte pro lingvaj baroj. La leciono en tio: por interkompreniĝi inter si, esperantistoj ne bezonas interpretiston. Nur Esperanto

sufiĉas!

Post la skeĉo, s-ro Victor LUFIMPU voĉlegis la salutmesaĝon de Mireille Grosjean, la nuna prezidanto de ILEI. Mireille per sia mesaĝo esprimis sian entuziasmon: "Tiu 5-a de julio estas granda tago. Ja, tio estos, mi esperas, la komenco de fruktodona kunlaboro inter la Kongaj agantoj de UNESKO kaj la agantoj de la Esperanto-movado en DR Kongo". Finante sian paroladon ŝi skribis: "La ligoj kiuj estas kreataj hodiaŭ ĉi tie en Kinŝaso inter Nacia Esperanto-Asocio kaj la Nacia Komisiono por UNESKO estas ekzemplaj, ili ekzistas en simila maniero en Kubo, jen ĉio... Ili estas modelo el kiuj ni ĉiuj devas inspiriĝi. Mi feliĉiĝas pri ilia sukceso".

La paroladoj finiĝis per tio de la Konstanta Sekretario de UNESKO, kiu deklaris: "La pordoj de la Nacia Komisiono por UNESKO en DR Kongo estas ekde nun malfermitaj kaj vin ni subtenos en viaj diversaj aktivaĵoj por la progresigo de tiu lingvo en nia lando". Li tiam invitis la Direktorinon Bernardine doni la atestilon al la prezidanto de DKEA. Tio estis farita post kiam ŝi diris kelkajn kuraĝigajn vortojn al la funkciuloj de DKEA.

Koncerto de la artisto Rock TAMBA, kuna kantado de la nacia himno kaj tiu de Esperanto, sekvitaj de vizito al la ekspoziciaj esperantaj libroj, DVD, kasedoj, ktp fermis la ceremonion en gaja kaj speciala etoso.

Victor LUFIMPU LUKOLAMA



"Ĉiu el ni devas studi Esperanton kaj disvastigi ĝin laŭ sia eblo, por ke ĝi estu tagon post tago pli vaste konata, por ke ĝi estu akceptita de ĉiuj nacioj kaj registaroj de la mondo, kaj fariĝu parto de la programo en ĉiuj publikaj lernejoj".

Inundoj en Lomeaj stratoj



202, strato « fidélité » Nukafu - sept. 2014

En Lomeo – la ĉefurbo de Togolando – estas multaj kvartaloj vere luksaj. Aliaj kvartaloj ne estas malbonaj, sed ne tiom luksaj kiel tiuj de riĉuloj. Kiam oni ankoraŭ esploras kvartalon al kvartalo oni rimarkas, ke iuj estas eĉ pli aĉaj. Sed komuna trajto por ĉiuj kvartaloj estas, ke akvoj inundas preskaŭ ĉiujn dum la pluvaj periodoj.

Eblas kompreni, ke oni konstruas domojn en Lomeo sen konstruo-permeso, kaj estas en kelkaj kvartaloj domoj tute senorde konstruitaj. Oni eĉ konstruas sur publikaj trafikvojoj, en administraj rezervejoj ktp, ĉar la vendado de terenoj apartenas ne al la ŝtato sed al individuoj. Pli ofte la posedantoj de terenoj ne priatentas la ĝeneralajn preskribojn pri la urbanizado. Ili vendas kiel ajn siajn terenojn, kiujn multaj aĉetas ofte kun nesaciado de gravaj danĝeroj, kiujn ili riskas.

Aliloke, ne estas la sama problemo. Manko de simpla kanaletoj por dreni la akvojn ĝis rivero aŭ al la maro kaŭzas tiujn inundojn. Ne nur en *Nukafu* akvoj inundas domojn, sed ankaŭ en aliaj kvartaloj, eĉ kvartaloj kiuj neniam antaŭe spertis inundajn problemojn. Sed *Nukafu* ja troviĝas preskaŭ en la koro de la urbo. Tamen ties enloĝantoj suferas pro akvoj jam de multaj jaroj. Kiam pluvas ĉiuj stratetoj subite dronas en akvoj, ĉio baraktas en akvoj: homoj, domoj ktp. Ne plu estas eĉ vojeto por piediri. Por eliri el la domo, oni tiam estas devigata trairi la akvojn plejofte sen botoj.

Pluvsezono postulas eksterordinarajn klopodojn fare de enloĝantoj. Kiam pluvas ĉefe dumnokte ĉiuj restas sendormaj, oni

atente gvatas aŭ por eventuale alarmi kaze de inundo aŭ por konstrui/fortigi digon por malhelpi la antaŭenigon de la akvoj. Pluva sezono fakte konsistigas veran inferon por Lomeanoj, ĉar ĝi kaŭzas embarason ĉe multaj el ili. Se neniu efika solvo estos trovita, post kelkaj jaroj multaj domoj pereos, des pli ĉar homoj konscie aŭ ne enterigas iom post iom proprajn domojn sub la sablo.

Alia problemo estas, ke pro la stagnaj akvoj kuloj rapide multobliĝas, kaŭzante malarion. Dume, krioj de ranoj malebligas endormiĝon nokte.

Ĉiun jaron homoj maltrankviliĝas, ĉar estas pli kaj pli da grandaj pluvoj. Krome, la lernejoj kiuj provizore gastigas elpelitojn de akvoj iom post iom estas mem inundataj kaj kelkaj el ili eĉ detruigatas pro mal-solideco. Jen junuloj organizas sin: en iuj kvartaloj ili konstruas pluvsezono pontojn el lignaĵoj per kiuj eblas iri de unu loko al alia kontraŭ pago de 50 XOF. En aliaj kvartaloj ties enloĝantoj eĉ kotizas monon por proprapoŝe konstrui ŝajnajn kanalojn.

La urbaj aŭtoritatoj siaflanke ne ŝajnas interesiĝi pri efika kaj daŭrpova solvo al la fenomeno de inundoj en la urbaj kvartaloj. Anstataŭe, ili haste preferas distribuadi nutraĵojn, vivaĵojn al la viktimoj de katastrofo, kiam la akvoj iom post iom retiriĝas de la domoj. Io tia certe estas salutinda, sed bedaŭrinde, laŭ mi, tio ne konsistigas la veran solvon. Plie, iuj rikoltas politikan profiton el tiu asistado, postulante de la helpricevintoj, ke kompanse ili voĉdonu por ilia partio dum la balotadoj. Alie, ili estus flanken lasitaj venontan fojon.

Kiel subteni la revuon BABILANTO?

Disponigante monon al la revuo, ekz. 10 eŭrojn aŭ pli.

La monon oni bonvolu ĝiri al la konto "apto-c" ĉe UEA.

Posta informo al la redaktoro pri la pago rajtigas ricevi ĉiujn numerojn de la jaro.

Antaŭaj numeroj estas rete riceveblaj kontraŭ peto al la redaktoro aŭ aliĝo al la tiucela dissendolisto. Tio ebligas ankaŭ ricevon regulan de informoj pri la movado en Togolando.

Oni do sendu malplenan mesaĝon al: esperanto-en-togolando-subscribe@yahoo.com

Memvolan mondonacon oni sendu al la uea-konto "apto_c" de APETO

Redaktoro: Adjé Adjévi

Poŝta adreso: 06 BP 61807, Lomé-TG Togolando

Tel: +228 90 25 75 49, 22 57 22 80

adjevia@gmail.com

adjevia@yahoo.fr

Ĉu vi jam pagis vian jarkotizon al UTE?

Jen do la okazo por plenumi tiun devon vian, ĉar estas la sola maniero por vivteni nian landan Asocion dum tiuj tre malfacilaj momentoj.

La pago de tiu ĉi kotizo certigas vian membrecon ĉe UTE en la jaro 2014.

Bonvolu kontakti la kasistinon Valentine je 90969550. Retadreso de UTE: utetogo@hotmail.com

Pour lire des articles récents sur l'Espéranto au Togo, vous devez vous inscrire à:

esperanto-en-togolando-subscribe@yahoo.com

ou visitez le site de l'UTE: <http://unuighotogolandaporesperanto.jimdo.com>

Avec ce lien: <http://unuighotogolandaporesperanto.jimdo.com/ali%C4%99Dilo>

Vous pouvez télécharger aussi le formulaire d'adhésion à l'UTE.

L'adhésion est peu coûteuse et elle nous est d'une grande aide pour soutenir et développer la communauté Espérantiste au Togo.

Veuillez nous rejoindre - UTE a besoin de votre aide!